Heinrich Heine,

# Kie, laca vagabondo

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Kie, laca vagabondo,
trafos mi al lasta hejm'?
Ĉu sub suda palmofrondo?
Sub tilio apud Rejn'?

Ĉu min en dezert' enfosos
haste ies fremda man',
aŭ en sablo mi ripozos
borde de la ocean'?

Kie ajn! Min la ĉieloj
brakos, kiel tie ĉi,
kaj funebro-lampe steloj
ŝvebos nokte super mi.

*Traduko de la Germana poemo "Grabspruch" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* KÁLMÁN KALOCSAY *(Kalmano Kaloĉajo, ∗1911 – †1976).*

*Arg-63-1083 (2010-05-26 19:45:24)*

Heinrich Heine,

# Tombosentenco

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kie estos ripozejo
lasta de migranto mi?
Ĉu sub palmoj en forejo?
Aŭ ĉe l´ Rejno sub tili´?

Ĉu enfosos min malpie
iu en dezerta land´?
Aŭ ĉu mi ripozos ie
en la sablo de marstrand´?

Tamen, min ĉirkaŭos ĉie
la ĉiel´ de l´ granda Di´,
steloj tie ĉi kaj tie
lampe ŝvebos super mi.

*Traduko de la Germana poemo "Grabspruch" de* HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1993.*

*MR-261-1c / Arg-63-123 (2010-05-26 19:44:33)*